

## Japana Socialista Partio projektas enkonduki Esperanton en la ĝeneralan edukadon en Japanujo

La Socialista Partio, kiu estas opozicia partio laŭnombro la plej supera en la politika kampo de Japanujo, publikigis la 19-an de nov., 1966, la reform-projekton pri edukado sub la titolo : “Unua Projekto de Baza Plano por Reformo de la Eduka Sistemo”. Al tiu novaĵo la japana gazetaro de la sekvanta tago dediĉis multekolonan spacon por porti artikolojn kun resumo de la projekto. Kio precipe kaptis nian atenton estas la fakto, ke la projekto, ellaborita de la Politika Komitato pri Eduko kaj Kulturo de la nomita partio, enhavas ĉapitron, en kiu la instruado de Esperanto estas eksplicite regulita en la programo de deviga “ĝenerala edukado” en Japanujo.

La nuntempa edukado en Japanujo estas bazita sur la tiel nomata sistemo de 6-3-3-4, efektivigita nelonge post la fino de la dua mondmilito : nome, la 6-jara Elementa Lernejo, 3-jara Mezlernejo, 3-jara Altlernejo kaj 4-jara Universitato. El tiuj kvar lernejaj etapoj, la du unuaj, 6 kaj 3 (sume : 9 jaroj) formas la devigan edukadon.

Al tio, la socialistoj kontraŭmetas la projekton de nova sistemo, laŭ kiu la jarkonsistoj entute fariĝas pli ampleksaj : 4-5-5-4, kun enklasigo ankoraŭ de la pli junaj aĝo-grupoj ol ĝis nun, tiel, ke la periodo de deviga edukado plilongiĝas ĝis 14 (4-5-5) jaroj.

La diversetapaj lernejoj, fondotaj laŭ la socialista plano, nomiĝas : (provizoraj nomoj) — Infanlernejo, Popollernejo, Sinteza Lernejo por Scienco

kaj Tekniko, kaj Universitato.

Unue, la Infanlernejo estas 4-jara, deviga por geinfanoj en la aĝo-grupoj de 4 ĝis 7 jaroj (respondantaj, en la ekzistanta sistemo, al la infanoj respektive de l' infanvartejo kaj la kindergarteno, kaj al la klasoj 1-a kaj 2-a de l' elementa lernejo) ; due, la Popollernejo estas 5-jara, deviga por geknaboj en la aĝo-grupoj de 8 ĝis 12 jaroj (respondantaj al la nunaj klasoj 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a de l' elementa lernejo kaj la klaso 1-a de la mezlernejo) ; trie, la Sinteza Lernejo por Scienco kaj Tekniko estas 5-jara, deviga por geknaboj en la aĝo-grupoj de 13 ĝis 17 jaroj (respondantaj al la nunaj klasoj 2-a kaj 3-a de la mezlernejo kaj ĉiuj tri klasoj de l' altlernejo) ; fine, 4 jaroj aŭ pli, laŭcirkonstance, de l' universitato.

Tiel, la 4-jaran edukadon por infanoj sekvas la 10-jara “ĝenerala edukado”, konsistanta el du periodoj : kiel unua-perioda, la 5-jara Popollernejo, kaj kiel dua-perioda, la 5-jara Sinteza Lernejo por Scienco kaj Tekniko. Kaj en la Popollernejon — la socialistoj projektas enkonduki la lingvon Esperanto, kiel devigan lernobjekton, “por profundigi la internacian komprenon, kiel ankaŭ por propedeŭtiko al la instruado de fremdaj nacilingvoj”.

Rilate la motivojn por la instruado de Esperanto kiel deviga leciono, la socialistoj substrekas tri jenajn punktojn :

1) La instruado de Esperanto estas efika kiel propedeŭtiko al la instruado de fremdaj nacilingvoj. (Eksperimentoj pravas, ke la lernintoj de Esperanto ellernas pli rapide la anglan lingvon.)

2) Per la nov-sistema 10-jara ĝenerala edukado, kiu estas deviga, ni celas la formadon de la internacikonsciaj japanoj, kiuj, mastrante la patrinan lingvon ĝustamaniere, scipovas Esperanton kiel la duan lingvon, kaj ellernas ankoraŭ unu el la fremdaj nacilingvoj.

3) Per la ekzemplo, ke ni ĉiuj japanoj ellernas Esperanton, ni deziras plenumi la pioniran rolon por la disvastigo kaj de la ideo de mondpaco kaj de la komuna lingvo de la mondo. La lingvo Esperanto estis elpensita de D-ro Zamenhof, Pollando, en la jaro 1887. Kiel komuna lingvo de la homaro, ĝi ligiĝis kun diversaj ideoj de mondpaco, kaj jam havas internaciajn organizojn. La japana popolo, kiu alte tenas la Packonstitucion kaj aspiras plenumi la pioniran rolon ankaŭ por la starigo de Mondfederacio, devas ellerni Esperanton kaj samtempe proponi al ĉiuj regnoj de la mondo, ke ĝi estu la komuna lingvo ĉe ĉiuj internaciaj konferencoj.

Kio precize movis la Socialistan Partion ja enmeti Esperanton — tiel

bele ! — en sian propran edukan programon, pri tio ni ankoraŭ ne scias. Sed ni flatas nin pensante, ke ne restis tute senutilaj la diversaj E-propagandiloj, kiujn ni sendis, laŭpete, al la Estro de la supre menciita Politika Komitato de la Socialista Partio. (Cetere, vd la frontartikolon de “Oomoto”, N-ro marto-aprilo, 1966). Kaj el ĝenerala vidpunkto, oni povus citi kelkajn faktorojn, kiuj al tio kontribuis : la Jaro de Internacia Kunlaboro, 1965 ; la Kampanjoj por la UEA-Propono al la Unuiĝintaj Nacioj kaj por la EPA-Peticio al la Japana Parlamento ; la 50-a Universala Kongreso en Tokio ; la propaganda agado kaj la ĝenerala interesiĝo de publiko pri Esperanto en ligo kun la supre cititaj eventoj.

La “Unua Projekto” de la Japana Socialista Partio nun estas ankoraŭ — nura projekto. Eĉ antaŭ ol doni al ĝi definitivan formon, la Partio ankoraŭ prilaboros ĝin, kaj devos prezenti ĝin por ĝenerala aprobo de sia kongreso en decembro, 1967 ; poste oni disvolvos 20-jaran “Movadon por Edukado” kun la celo “komplete efektivigi la planon ĝis la fino de tiu periodo”.

Kvankam la specialista reago — individua kaj kolektiva — al la Projekto baldaŭ venos, la gazetara jam aperis en la sekvantaj tagoj per publikigo de redakciaj (anonimaj) komentoj en la regulaj kolumnoj — kelkaj kun aparta mencio pri Esperanto. Jen kelkaj fragmentoj el tiuj :

“Kia agrabla ideo instrui Esperanton al la junaj lernejoj !” — Jomiuri Ŝinbun (en “Henŝuu-teĉoo”) 21 nov. , ‘66.

“Preskaŭ cent jarojn post la publikigo de Esperanto, ĝi ankoraŭ ne estas adoptita kiel oficiala lingvo eĉ ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Se la projekto realiĝos, tiam la japana popolo fariĝos pioniro por la disvastigo de la mondlingvo. Tiel okazos, ke “en la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis Esperanto”. — Mainiĉi Ŝinbun (en “Joroku”) 24 nov. , ‘66.

“... Cetere, ni dubas, ĉu Esperanto taŭgus aŭ ne kiel propedeŭtiko por la fremdaj lingvoj. Esperanto estis iniciatita de d-ro Zamenhof, Pollando, en la jaro 1887. Ni scias ankaŭ, ke ĝi estas sintezita el lingvoj de Eŭropo. Tamen, ĉu iu lingvo, sole pro tio, ke ĝi estas lingvo sintezita, kapablas funkcii kiel propedeŭtiko por la fremdaj lingvoj ? La opinion de lingvistoj pri la demando ni ŝatus aŭskulti”. — Kioto Ŝinbun (en “Bongo”) 21 nov. , ‘66. (Por iom klerigi la redakcion de Kioto Ŝinbun tiurilate, ni tuj skribis leteron kaj sendis ĝin, kune kun abundo da materialo pri Esperanto, al la redakcio.)

Kiel ajn estu, la publikigo de la socialista Projekto pri enkonduko de Esperanto en la japanan ĝeneralan edukadon certe estas bonvena por la intereso

## La nomada vivo

Okazis al mi la lastajn tagojn trovi en kampara terparto — lastajn tagojn de la pasinta jaro kun abunda suno, varmeta, vintra, plena de amik-eco.

Verdaj estas la kampoj, kaj la riveroj, svelante pro la abundaj pluvoj, malsupreniĝas kantante al Grekaj maroj. Eĉ la soifantaj fluejoj sekiĝintaj dumsomere retrovas nun la kialon por sia ekzisto kaj fieriĝo. La platanoj tapiŝas per oraj folioj la terfendojn. Kaj la nudaj branĉoj transformiĝas en la senondan serenecon, envivigitaj de humora kaj bonvida disono de iaj favorspiritaj dioj. La poezio, certe, marŝas kune kun la ŝafaroj, de travintrejo al travintrejo. Tie, la helaj idoj de la ŝafoj permesas al ni senti kiom bela estas la vivo-sento. Fine, la ciganoj kiuj trapasas la solecon kun siaj malrapidaj ĉaroj, unuj piedirante, aliaj sur la ĉaroj,

sed multkoloraj, malpuraj, ĉiam sen ordo sur si kaj sen ia maltrankvilo, jen la raso kiu obeas al la primitiva instinkto de l' nomadismo.

Dum mi rigardadis ilin senzorgaj, kun iliaj hundoj apudkurantaj, kun la infanoj duonnudaj, kun la infanoj garnitaj per malkaraj ornamaĵoj, mi meditadis ke la ciganoj eternigas ne nur la memoron, sed ankaŭ la realecon de la primitiva homo, de l' homo kiu sekvadis la sovaĝajn bestojn de loko al loko. Ligita kun la vivneceso, pli forta ol ĉe la moderna homo, armita per ŝtono aŭ paliso, li perĉasis sian vivrimedon. Lokon sian li ne havis. Loĝanto, ne civitano, sur la tero, antaŭ ol komenci la pensadon. Li estis regata de la senkompata despoteco de l' instinkto. Lia tuta vivo konsistis nur el la flaresplorado en mallumo kaj la senhalta batalo de unu danĝero al alia. Neces-

de nia afero. Ni, niaflanke, subtenados ĝin per ĉiuj rimedoj kaj klopodos por ĝia sukcesigo. Kaj nun ni petas al niaj karaj legantoj: bonvolu skribi al S-ro Goro Jamanaka, (Estro de la Politika Komitato pri Eduko kaj Kulturo, la Japana Socialista Partio,) Nippon Syakai-tô, Syakai-Bunka-Kaikan, Nagatatyô, Tiyoda-ku, Tokio, Japanujo, por montri al li kaj liaj sampartianoj, ke ilia iniciato estas mondscale bonvenigata kaj subtenata !

La Redakcio de Oomoto

is pasi miloj da jaroj por ke li povu sedimentiĝi en iu loko, ke li havu kulturkampon, poste li apartigu ĝin disde aliaj kulturkampoj, li sekurigu ĝin al si kontraŭ la najbaro, li malsovaĝigu beston kaj faru ĝin sia subulo, fine li faru unu mondon sia. La moderna cigano gardas la impulson je translokiĝo de la primitiva homo. Li jam ne estas devigata sekvi la sovaĝan ŝafaron kaj povas, se li volas, instaligi ie kaj havi lokon sian, ankaŭ hejmon kaj bestojn kaj alian havaĵon. Sed tamen, ankoraŭ restas en li tiom reganta la instinkto de l' nomadismo ke, eĉ se li estus devigata radikiĝi iuloke, li sentus sin malfeliĉa. Ĝuste tial, prenis lin la poezio kaj levis lin, malgraŭ lia malpureco, al simbolo de senzorgeco kaj libereco.

La civilizo ĉiam, pli kaj pli senbranĉigas la instinktojn, subigas ilin al rigora disciplino. Certe, ĝi ne forgesas ke la homo ne estas esence nur unu fasko da instinktoj, kiel la besto. Kaj ĝi ne forgesas ankoraŭ, ke, se la instinktoj malvigligas, sekvos totala pereco de la speco. Sed ĝi klopodas bremsi ilin, subigi ilin al la aŭtoritato de la menso, kaj igi ilin utilaj tiel al la individuo kiel al la socio. La ciganoj ne interesiĝas pri la socio. Ili konsideras ĝin malamika forto kiu embuskas kontraŭ ilia sendependado, kiu kontraŭagas ilian rajton vivi

laŭ sia plaĉo. Certe, ili restas neevoluintaj tirataĵoj de l' sorto. Sed mi opinias ke ili ne flegas grandan estimon al nia civilizo, al unu civilizo kiu imponas al la homoj tiom da devigoj, ekde la devigo de korpa pureco ĝis la devigo de ĝentila konduto kaj spirita kulturo. Leĝo de ciganoj estas la leĝo de la minimuma klopodo. La elementa bezono kaj la elementa penado. Kaj la senĝena travivado en la malfermita kamparo. Unua cigano, enprofundigita en la subterejo de multetaĝa konstruaĵo, prezentus fenomenon antinomian kaj neeksplikeblan.

Sed el meditado sedimentiĝas la demando, ĉu la inklino al la nomada vivado, tiu ĉi primitiva instinkto de spacoŝanĝo, estas jam mortinta. La respondo estas ne! Nur ĝi prenis aliajn nomojn. Tio, kio estis materia bezono, dum la unuaj tempoj de l' homa prahistorio, fariĝis poste anima kaj spirita bezono. Tiel, ni daŭre restas nomadoj. Kaj la moderna civilizo, anstataŭ malaperigi, pli kaj pli fortigis la instinkton de spacoŝanĝo.

La civitoj de la 20-a jarcento, estas senlimaj abelujoj, kie la homo ne havas lokon por sin movi. Por ke li povu, morgaŭ aŭ postmorgaŭ, daŭrigi sian ekziston, li devas resti senmova. Li jam foriris el la senlimaj kampoj, el la altaj montopintoj, el la vastaj kaj malfermitaj maroj. Li perdis

# La “Esplorado de l’ Vivĝojo” de H. Deguĉi

## aperis kiel kometo en la japana libromerkato

Vortoj de Hidemaru Deguĉi (nur parte esperantigitaj en “Memornotoj” de nia revuo) estas la neelĉerpbla fonto de inspiroj por ĉiuj oomotoj. Ĝis nun, ili estis eldonitaj en sep volumoj, kaj reeldonataj, de Tenseiŝa, la propra eldonejo de Oomoto. Tio signifas, ke ili estis kvazaŭ por iluminado de pli aŭ malpli fermita societo.

Pasintjare okazis, ke unu el la plej grandaj eldonejoj en Japanujo, la Koodanŝa, Tokio, ekinteresiĝis pri eldono de Vortoj de H. Deguĉi — dank’ al la interveno de du amikoj de Oomoto, kiuj, siavice, havas influan rilaton kun la nomita eldonejo, nome, S-ro Hideo Haga, la aŭtoro de “Filoj

de Dio, Adorantoj de Dio” (la Oomoto-fotalbumo) kaj Prof. Tadao Umesao, la aŭtoro de “Esploroj pri Japanujo”, en kiu Oomoto estas prezentita sub plej diversaj aspektoj. Laŭ instigo de s-ro Haga kaj apoge de rekomendo de prof. Umesao, la Koodanŝa decidis eldoni en unu volumo partojn el la verkaro de H. Deguĉi.

Tiel, la libro, titolita “Esplorado de l’ Vivĝojo” de Hidemaru Deguĉi, aperis el la Eldonejo Koodanŝa, la 25-an de septembro, 1966, por eniri en la ĝeneralan libromerkaton de Japanujo. Apenaŭ tri monatojn post la eldoniĝo, t. e. fine de la sama jaro, la libro jam atingis la eldonnombron de 200,000, rangante kiel la Unua en sia

sian grandan spiradon, sian heroecon, kaj fariĝis mirakla insekto, surgluita en ia hermetike ŝirmita vitrino de muzeo. Iaj kvadratoj de tero, kiom sufiĉas por lia morto, estas jam konsiderataj sufiĉaj ankaŭ por lia vivado. Ĉe la moderna hejmo, unu koridoro, larĝa unu metron kaj duonon, estas granda privilegio. La centraj stratoj reduktiĝis kiel kanaloj en kiuj aliras kaj deiras senĉese amaso da radoportoj, homoj kaj malesperoj. Unu homo vivas tre proksime al alia homo,

kaj tamen ili restas senesperige solecaj. Kiel eliro el tio prezentiĝas nomadismo. Dank’ al la abundaj transportiloj, la homoj rapidas al la trajno, al la aŭtobuso, al la vaporŝipo, al la aeroplano, kaj iras disvagigi sian solecon, sian malplenecon kaj sian enuon al la ĉiuspecaj stratoj de l’ mondo. Ĉiuj ĉi tiuj, kiuj vojaĝas senĉese, kiuj marŝokruĉiĝas kaj kontraŭanguliĝas en la havenoj, en la fervojaj stacioj, en la stacioj de l’ aŭtobusoj, en la aerodromoj, estas en

kategorio en tutlanda statistiko pri la disvendigo de libroj. (Tiu cifero ne estus tiel fenomenala en nia lando, se temus pri bona novelo aŭ romano; sed por verko vivfilozofia kaj noveldonita, ĝi certe estas eksterordinara, tiom pli, ke ĝi estas plue kreskanta.)

Ne mirinde, la libro profunde impresis la animon de la legantoj, kiel ni ĝoje konstatas el multegaj omaĝoj kaj dankoj adresitaj al nia Centro. La skribintoj de tiuj leteroj reprezentas la plej variajn tavolojn de socio: lernejoj, studentoj, laboristoj el oficejoj kaj fabrikoj, dommastrinoj, instruistoj, profesoroj, religianoj, komercistoj, politikistoj, ktp, ktp.

Generacioj sinsekvas. Sed kia kontrasto, ke la malnova 'mokus kaj batis' nian Majstron ĝis preskaŭmortige, dum la nova varme akceptas lian verkon por klerigo spirita. Ni esperu pri la estonteco de la homaro.

— La Red.



“Esplorado de l’ Vivĝojo”,  
261 paĝoj (13×18.7 cm)

la realo nomadoj. La celtrafaĵo de la prahistoria epoko estis la ĉasaĵo por la nutrado de la korpo. La celtrafaĵo de la moderna vivo estas la plenigo de la granda vakuo, de la anima kaj spirita vakuo. Nia primitiva antaŭulo persekutis la sovaĝan beston, por engluti ĝian karnon, por elpreni ĝiajn ostojn kaj fari ilin ornamaĵo kaj instrumento, por forpreni ĝian haŭton kaj kovri per ĝi sian nudecon. La moderna homo, starigis kaptilojn en siaj songoj, klopodas efekt-

ivigi siajn fuĝemajn bonatendojn, satigi sian animan kaj spiritan avidemon, amikiĝi kun la lin ĉirkaŭanta mondo kiu, malgraŭ la facileco de komunikado, reduktiĝas por li senespere fremda.

Nomadismo, el alia vidpunkto, estas rifuzo de la senmoveco, esprimo de bezono por la senĉese ŝanĝiĝanta homo, en la senĉese ŝanĝiĝanta universo. Per la movo, ĉiu el ni fariĝas unu aktiva molekulo de l’ universo. Pro tio ĉi, regas nin ĉiam la deziro

por la ŝanĝo. Animoj nomadaj en ni foje sin esprimas per simpla translokiĝo, foje per senĉesa vojaĝado, foje per traserĉado de pli esenca interna ŝanĝo. Tiel, disde la vagado en la materian spacon, ni venas al aliaj vagadoj, en spacojn alispecajn, supercajn, en la nomadisman de alta strukturo, kiu metamorfozas nian konscion pri la mondo kaj riĉigas ĝin per multvaloraj elementoj.

Ŝajnas ke nia destino sur tiu ĉi tero, estas la movo, la ŝanĝo, la klopodo profunde senti, konkeri, familiariĝi kun ĉio: lokoj, homoj, sentoj, ideoj, cirkonstancoj. Kaj ju pli la ĉiutaga vivo fariĝas sufoka, aŭ ankaŭ ju pli multiĝas niaj postuloj por pli plena ekzisto, des pli la vagado ligiĝas kun la homa edukado. Ne, do, miru pro tio ke la vojaĝado fariĝis ordinara aranĝo en niaj aferoj. La facileco de translokiĝo servas instinkton profunde radikiĝintan en ni kaj multigas dezirojn kiuj naskiĝas el bezono de la primitiva homo, simpla bezono de vivado tiam; devigo al unu pli bona travivado nuntempe.

Kiel nomadoj ni ekmarŝis kaj tiaj ni ĉiam restas. Nestabileco estas nia destino. Ŝafistoj de revoj, dresistoj de ĥimeroj, ĉasistoj de novaj impresoj, ni transiras de paŝtoloko al paŝtoloko, eterne senkontentaj, eterne duonperfektaĵoj, neplenigitaj. Ni memoru kun kia sento ni ekiras por unu vojaĝo. De

la momento kiam ni troviĝas ĉe kajo, aŭ en atendejo de fervoja stacio, ŝanĝiĝas nia gusto, eĉ nia konduto. Elemento de magio enŝoviĝas en nian konscion kaj metamorfozas ĉi tiun je nova konscio. Vojaĝantoj ni, pilgrimantoj de l' mondo, ni ne estas ĉiam la samaj homoj. Tuj kiam ni trapasos la limojn de nia loko, ni fariĝas pli liberaj. Kaj kiam ni elĉerpos tiun nian liberecon kaj ŝanĝos ĝin je netolerebla ĉiutagaĵo, ni samarde nostalgias la revenon, la konatajn personojn, nian hejmon, la fokuson de Itaki.

Ekzistas ankaŭ tiuj, kiuj evitas sisteme la migran aventuron. Ili seniĝas je ĝia beleco por ne subiĝi al ĝia ĝeno. Sed ankaŭ ili, se ili estas individuoj vivantaj, se ili ne decidis morti antaŭ ol venos la mortomomento, lasos sin al alispecaj vagadoj. Ili vojaĝas inter la homoj, inter la libroj, inter la korpoj, amantoj de la tuŝo, inter meditadoj de marbordo al marbordo al mondoj foraj... La plej pasiva sinteno estas la frekventado de rememoroj, kiu, kvankam mirinda iufoje formigrado, tamen fariĝinte obstina okupo, montras ke ĉio jam pasis, ke la nuntempo estas jam kadavro preta ĉirkaŭiĝi per siaj enterigaj tolaĵoj kaj englutiĝi en la senfinan kaj anoniman tempon.

El la greka: S. Sakellaropoulos



# Vojaĝraportoj de niaj du delegitoj

En la jaro 1966 la Oomoto-Junulara Organizo delegis por la unua fojo du reprezentantojn al Eŭropo, por ke ili partoprenu la 51-an Universalan Kongreson de Esperanto kaj aliajn aranĝojn. La tiucele elektitaj reprezentantoj, f-ino Jumijo Iŭamoto kaj s-ro Kinsuke Ito, ambaŭ revenis hejmlanden tute viglaj. Ni petis de ili raporton pri la vojaĝo kaj jen sekvas la respektivaj artikoloj de ambaŭ gejunuloj.

Estas, cetere, bona okazo nun aldiri: post la publikigo de nia anonco pri la veturontaj du reprezentantoj, ni eksciis en la lasta momento, ke ankaŭ s-ino Joŝi Suzumori, profesoro de Kanazaŭa Virina kolegio, decidis partopreni la Kongreson en Budapeŝto, kiel reprezentanto de la Virina Asocio de Oomoto; ŝi do vojaĝis kune kun la junaj delegitoj, kaj tial en la sekvantaj raportoj kelkfoje aperas ŝia nomo.

Oomoto-Junulara Organizo

## Raporto pri Fakkunsido de Oomoto kaj nia vojaĝo

*Kinsuke Ito*

Kiel la unuaj reprezentantoj de Oomoto-Junulara Organizo ni, f-ino Iŭamoto kaj mi, kune kun s-ino Suzumori, reprezentanto de la Virina Asocio de Oomoto, partoprenis en la 51-a Universala Kongreso de Esperanto kaj okazigis la fakkunsidon de Oomoto de 2:30 ĝis 4:30, la 31-an de julio, 1966, tuj post la inaŭgura soleno de la Kongreso. La Programo de la fakkunsido estis jena:

- 1) Ĉanojo (te-ceremonio)
- 2) Prelego pri Oomoto-doktrino
- 3) Diapozitivoj pri Oomoto
- 4) La filmo: "Oomoto-Internacia Festivalo"

En la ĉambro Hodler, nia kunsidejo, estis ĉirkaŭ 60 seĝoj kaj je 2:30 ĉiuj seĝoj estis jam plene okupitaj. Unue, por havi okazon refreŝigi sin post longa vojaĝo kaj ioma streĉiĝo dum la ĵusa inaŭgura soleno, ĉiuj partoprenantoj trinkis la japanan verdan teon, kiun pretigis en maniero de ĉanojo la du oomotaninoj, prof-ino Suzumori kaj f-ino Iŭamoto.

Poste mi prelegis pri Oomoto-doktrino dum 30 minutoj. Ĉiuj ĉeestantoj fervore aŭskultis spite de varmego en la ĉambro; inter ili estis kelkaj, kiuj notis en sia

kajero. Sekvis la prezentado de la diapozitivaj pri la historio kaj teritorio de Oomoto. Ĉiuj estis surprizitaj pro la aspektoj en la teritorio de Oomoto, detruitaj dum la "dua persekuto" fare de la japana registaro; ni prezentis ankaŭ la 16-mm. koloran filmon de la Oomoto-Internacia Festivalo, 1966. Niaj geamikoj tre entuziasme rigardis la kolorriĉan kaj abunde interesan enhavon de la filmo. La voĉo de s-ro Esumi, klariga parolanto de la filmo, sonoris agrable al la oreloj de la aŭskultantoj.

Inter la ĉeestantoj troviĝis s-ro Sidorowicz (Pollando), s-ro Pamporov (Bulgarujo), s-ro Kehlet (Danlando), s-ro Möller (Danlando), s-ino Obrucewa (Ĉeĥoslovakujo) ktp., kiuj mem partoprenis la Festivalon, kaj plie kelkaj fervoraj anoj de IKUE, Martinus-Instituto kaj Blanka Frataro ankaŭ ĉeestis en la kunsido.

Pri la filmo "Oomoto-Internacia Festivalo", kiu sufiĉe bone reprezentis la bonegan etoson de la Festivalo, oni postulis prezenti ĝin denove kaj denove; ni prezentis ĝin 6-foje kaj pli ol 2,500 partoprenantoj vidis la filmon dum la Kongreso.

Post la 51-a U.K. ni vizitis multajn urbojn en Eŭropo.

*Budapeŝto*, Hungarujo: ni estis tre ĝojaj renkontiĝi kun s-ro Julio Baghy kaj d-ro I. Balla. Ni dankas d-ron Balla pro lia gastama afableco. Hungara "salami" estis tre bona.

*Knittelfeld*, Aŭstrujo: Knittelfeld kaj Kameoka estas en interrilato de ĝemelaj urboj. Oni afable akceptis nin kiel la oficialajn gastojn de Knittelfeld. Ni transdonis la mesaĝon de s-ro J. Oocuki, urbestro de Kameoka, al s-ro Albert Seitlinger, urbestro de Knittelfeld. D-ro Halbedl kaj fervoraj esperantistoj akceptis nin. Ni prezentis diapozitivojn pri japana arto kaj kulturo kaj ankaŭ prezentis japanan nordancon en "japana vespero".

*Stuttgart*, Germanujo: Ges-roj Kiefer kaj multaj esperantistoj afable akceptis nin. Ni havis du kunvenojn esperantistan kaj neesperantistan. Ni neniam povos forgesi la adiaŭan tempon kun s-ro Kiefer ĉe la stacio de Stuttgart.

*Reutlingen*, Germanujo: Estis granda ĝojo ke mi renkontiĝis kaj interparolis kun s-ro K. Schmidt, kiu estis kaj estas amiko de s-ro Koogecu Nišimura kaj aliaj malnovaj Oomotanoj.

*Hamburg*, Germanujo: S-ino Greter Zerbe, kiu partoprenis en la 50-a U.K. en

Tokio kaj Oomoto-Internacia Festivalo, akceptis nin. Ni estis tre ĝojaj prezenti la filmon en granda halo en la kunveno de esperantistoj.

*Flensburg*, Germanujo: Ĉi tie s-ro Moravec akceptis nin kaj bonege aranĝis la programon dum nia restado. La programo estis plene fiksita por multaj aferoj, kunvenoj, ekskursoj, promenadoj, manĝadoj ktp. Ni faris ĉion ĝuste laŭ la programo. Ni havis tri kunvenojn kun budhistoj, junaj kristanoj kaj oficistoj.

*Kopenhago* kaj *Helsingör*, Danlando: Granda ĝojo por ni estis ke ni povis renkontiĝi kun multaj anoj de Martinus-Instituto kun kiu Oomoto havas amikan rilaton. Granda feliĉo estis ke ni povis interŝanĝi opiniojn kun s-ro Martinus pri religio dum pli ol du horoj en la ĉambro de s-ro Martinus. Ni konstatis riciproke, ke la sistemo de Martinus-Instituto preskaŭ similas al la doktrino de Oomoto, kvankam Martinus eksplikas kosmon en scienca maniero, dum Oomoto en Spirita-religia maniero. Ni dankas al s-ro Schleicher kaj s-ro Kehlet pro la bona aranĝo dum nia restado.

*London*, Anglujo: Ni tre ĝojas kaj dankas pro tio ke s-ro H.W. Holmes venis al la flughaveno por renkonti nin. La nacia galerio kaj Brita Muzeo, al kiuj ges-roj Holmes gvidis nin, estis tre belaj kaj interesaj. Ni



La du delegitoj akceptataj en la urbodomo, Knittelfeld



Ĉe speciala aŭdienco : Papo Paŭlo VI inter s-ro Ito kaj s-ino Suzumori

povis ĉeesti en la kunveno de esperantistoj.

*Parizo, Francujo* : Ĉi tie estis antaŭe Eŭropa Centro de Oomoto, kie s-ro Koogecu Nišimura laboris dum longa tempo. Ni estis tre ĝojaj renkontiĝi kun simpatiantoj por Oomoto ĉi tie.

*Zurich, Svislando* : S-ro P. Enz kaj s-ro Lichtie bone aranĝis la kunvenon de "japana vespero".

La aspektoj de svisaj montaraj lokoj ja estis tiel belaj, kiel tiuj de fabellando. Vegetara manĝaĵo, kiun s-ro Enz donis, estis tre bongusta.

*Romo, Italujo* : La speciala renkontiĝo kun Papo Paŭlo VI donis pli da signifo al nia vojaĝo. Granda honoro kaj ĝojo por ni estis ke ni transdonis la mesaĝon de s-ino Naohi Deguĉi, la nuna gvidantino de Oomoto, al Papo. Ĉiuj religioj devas esti tolere-maj; se ne, en la mondo neniam fariĝos paco. Ni dankas al ges-roj Minnaja akcepti kaj gvidi nin.

*Sofio, Bulgarujo* : Mi sola vizitis la urbon kaj renkontiĝis kun multaj el Blanka Frataro kun kiu Oomoto estas en amika rilato. Mi neniam povos forgesi iliajn gastamajn afablecojn. Mi pensas, ke ĉi tie en Bulgarujo esperanto-movado estas plej bone organizita en Eŭropo. Mi estis surprizita ke ĉi tie estas multaj vegetaristoj. Mi salutas s-rojn B. Nikolov, Pamporov, Tanju kaj Gordanov. Mi raportas al vi, kun ĝojo, ke mia granda kofro, missendita al iu loko, revenis hejmlanden en ordo.

En la urboj, kiujn mi vizitis, ni prelegis pri Oomoto aŭ pri Japanujo; ni prezentis ĉanojn kaj no-dancon, kaj ni prezentis ankaŭ diapozitivon kaj la filmon de Oomoto-Internacia Festivalo.

Ni elkore dankas al ĉiuj amikoj en la urboj, kiujn ni vizitis, pro viaj afablaj akceptoj kaj aranĝoj.

Tiu ĉi vojaĝo tra Eŭropo restos unu el la plej bonaj memoroj en mia vivo.

## MIA VOJAĜO EN EŬROPO


*Jumijo Iŭamoto*

Estas ĝojo por mi havi okazon rakonti pri mia sperto dum la vojaĝo en orienta kaj norda Eŭropo. Pro la fakto ke mi vojaĝis eksterlanden por la unua fojo, ĉio, kion mi spertis dum la vojaĝo, montriĝis al mi tre freŝa kaj interesa. La vojaĝo daŭris 70 tagojn en 9 landoj, de la 15-a de julio ĝis la 23-a de septembro, 1966.

Mi, kune kun aliaj oomotanoj, s-ino Suzumori kaj s-ro Itoo, forlasis Japanujon la 15-an de julio. En la ŝipo ekveturinta de Jokohama nenia fremdeco ankoraŭ venis al mi pro tio ke plejmulte da pasaĝeroj estis japanoj, kaj ili ĉiam parolis en nacia lingvo. Post 3-taga veturado la ŝipo alvenis ĉe Nak-hodka, de kie aviadile kaj trajne ni daŭrigis la veturon ĝis Moskvo. Moskvo estis la unua urbo kiun ni tuŝis ekster nia lando. Grandega urbo ĝi estas! La stratoj estas tiel vastaj ke oni ne bone vidas de unu flanko la alian de la stratoj, larĝaj je 50-100m. Ambaŭ-flanke de ili estas starantaj aŭ 10-etaĝaj aŭ 20-etaĝaj apartamentaroj briakaj. Kiam ekvesperiĝas, sur la trotuaroj iras amaso da homoj kvazaŭ ŝafaro moviĝanta kondukate de ŝafisto. Estis mezsomero, la urbo grandioze siluetiĝas en la longdaŭra krepusko. Kvazaŭ spektaklo ĝi estis! La sekvantan tagon nin gvidis turista oficisto, parolanta japanlingve, al plej famaj lokoj en Moskvo; Kremlin-palaco, ruĝa placo, Moskvo-universitato, multaj muzeoj kaj statuoj, pri kiuj li fiere klarigis al ni. Vespere ni prenis la internacian trajnon por atingi Varsovion en Pollando morgaŭ posttagemeze. En la vagono ni triope okupis unu kupeon kaj komforte veturis.

En Varsovio ni havis la okazon viziti la tombon de D-ro Zamenhof. Deantaŭe mi

havis tiun ĉi deziron. En la fino de junio, kiam mi finpretigis mian vojaĝplanon, venis al mi invitletero el Varsovio, de samideano, kun kiu mi konatiĝis okaze de Oomoto-Internacia Festivalo. Dank' al tiu invito mi facile povis efektiviĝi mian deziron. La tombo estas en la tombejo de Judoj kaj la juda prizorganto gardas la pordon. Ni atingis tien vespere post la fermo de la pordo, sed la prizorganto afable malfermis ĝin por ni pro iom da trinkmono. La tombeŝtono estas granda kaj portas verdan stelon, malsupre de ĝi estas ĉizitaj kelkaj vortoj dediĉitaj al la Sanktulo. Apud tiu staras ankaŭ tombo de s-ino Klara Z.; ili estas, se mi ne eraras, starigitaj antaŭ 7 jaroj memore al 100-jara jubileo de Zamenhofa naskiĝo. Ni tre bonŝance vizitis Pollandon; la sama tago, la 22-a de julio, estis la festotago de 1000-jara datreveno de la fondo de la ŝtato. De la mateno ĉiuj vendejoj estis fermitaj krom surstrataj kioskoj de floroj kaj ĵurnaloj. En la centro de la urbo, okazis parado de armeoj kun diversaj armiloj kaj aviadila prezentado ĉiele, kio daŭris pli ol 2 horojn sub la somera suno. Ŝajne manifestacio de la arma forto de Pollando.



La tombo de Zamenhof, Varsovio



Vespere s-ro Itoo kaj mi prenis la trajnon al Budapeŝto en Hungarujo. Inter Varsovio kaj Budapeŝto kuŝas malgranda lando Ĉeĥoslovakujo, ni do devis trapasi du landlimojn inter Pollando, Ĉeĥoslovakujo kaj Hungarujo en unu nokto. La vagonlito estis sufiĉe bona por dormi, kaj mi bone endormiĝis. Sed meznokte vekis min pola kontrolisto kun timiga aspekto por peti mian pasporton. Per duonfermitaj okuloj mi priserĉis mian poŝon kaj prezentis ĝin al li, kiam li severmienne esploris kaj komparis min kun la foto en la pasporto. Nenio okazis. Li redonis ĝin kun la vorto "dan-kon" kaj foriris. Mi provis endormiĝi. Pasis apenaŭ unu horo sen dormo, kiam venis nun la ĉeĥa, kaj montrante al li la pasporton mi murmuris, "Kial? Mi estas la tute sama persono, kies pasporton oni jam kontrolis tuj antaŭ kelkaj minutoj". Kiel li povus kompreni min, sed li kun rideto foriris kaj mi malbonhumore endormiĝis. Mia dormado povis daŭri kelkajn horojn sen ĝeno. Sed ankoraŭ venis la kontrolistoj: ĉeĥa kaj hungara unu post la alia. Mi diris nenion, nur montris la pasporton kaj ili simpatie adiaŭis min. Ekster la fenestro jam estis matena krepusko. Mi do kvazaŭ tutan nokton servis al tiuj kompatindaj kontrolistoj, kiuj plenumas sian noktan deĵoron. Estas ja maloportune ke ĉiam, kiam oni en- kaj eliras la landojn, oni bezonas fari kontroladon. Mi pensis ke la mondo nepre unuigu por eviti tiel bagatelajn malagrablaĵojn.

De Budapeŝto ni rapidis al Pécs, kie okazas la 22-a Junulara Kongreso de TEJO. En la centra placo de la urbo la diverskoloraj standardoj de la partoprenantaj nacioj bonvenigis nin. Proksime de ĝi la malferma soleno komenciĝis en la subĉiela teatro, kiu estas ĉefa kunvenejo dum la kongreso. Kunvenis pli ol 1000 gejunuloj el 22 landoj. Programeroj de la junulara kongreso estis variaj, ĉio glate iris kvankam plurfoje ni

ricevis duŝon de la ĉielo. La internacian artan festivalon ni ĉiuj japanoj partoprenis kaj kiel japanan teatraĵon ni prezentis Ŝimajon, Ikebanon, Kaligrafion kaj Ĉanojon. La partoprenantoj el diversaj landoj prezentis siajn naciajn muzikon, dancon kaj poemdeklamon. Kontrasto de moviĝa kaj senmoviĝa beleco inter okcidenta kaj orienta artoj. Alian vesperon ni manifestaciis nian sanktan aferon en la urbo per la parada marŝo kun lampionoj, kion ne nur la esperantistaro, sed ankaŭ urbanoj mem sekvis kun granda emocio.

Dum unu semajno de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto la 51-a U. K. okazis en Budapeŝto. La malferman solenon sekvis multaj kunvenoj ĝeneralaj kaj fakaj, teatraj prezentoj, belartaj kaj oratora konkursoj, Internacia Somera Universitato, ĉiutaga kaj tuttaga ekskursoj ktp. ktp. Neniam mankis programeroj pro pli ol 4000 partoprenantoj, sed ejoj ĉiam estis malgrandaj; ĉie, ĉiu ĉambro estis plenplena de homoj. La superabundaj eĉ ne povis resti en la kongresejo. Tamen, ni ĉiuj estis feliĉegaj: spertante la komunan vivon en ESPERANTUJO, ni neniam sentis enuon kaj ĉiam estis okupataj pri interamikaĵoj.



Ĉe la Infana Kongreseto

La fakkunsidon de Oomoto, kiun ni havis la 31-an de julio, ĉeestis sume pli ol 150 geamikoj. Ni regalis ilin per teo kaj kuko el Japanujo; ili arde aŭskultis niajn prelegojn kaj ĝue vidis la filmon de OIF, kiun ni prezentis ankaŭ aliajn tagojn en pli granda salono. Dum la sama periodo paralele okazis infankongreseto, kiun partoprenis 88 geknaboj el 15 landoj, unu el Japanujo por la unua fojo.


Ĉar ni, s-ro Itoo kaj mi, estas urbanoj de Kameoka, ni estis invititaj al la lirika urbo Knittelfeld en Aŭstrujo, kun kiu Kameoka havas la ĝemelan rilaton de 2 jaroj pere de Esperanto. Ni do tuj post la finiĝo de l' kongreso, forlasis Hungarujon kaj veturis al Knittelfeld tra Vieno.

Knittelfeld estas bela urbo havanta ĉirkaŭ si montojn kaj riveron same kiel Kameoka. Ĉe la stacidomo atendis nin kelkaj estraranoj de la urbo kun bela bukedo. Ili kondukis nin en la urbodomon, kie ni transdonis la mesaĝon de nia urbestro kaj la desegnaĵojn de geknaboj el

Kameoka. Ni restis tie 2 tagojn kaj bone konatiĝis kun la urbo kaj urbanoj ĝuante la amikecon kaj tipe alpan pejzaĝon. Responde al ilia gastamo ni prezentis al ili la diapozitivojn pri Japanujo kaj japanan dancon Ŝimajo.

El Knittelfeld s-ro Itoo flugis al Amsterdam por ĉeesti mondfederalistan konferencon, kaj mi unu tagon poste veturis al Stuttgart en Germanujo, kie mia korespondanta amiko atendas organizante publikan kaj grupan kunvenojn por ni. Pro la lingva malfacilaĵo la trajna veturado timigis min. Ĉar mi devis 2-foje ŝanĝi trajnon por atingi Stuttgart. Tamen pro tio mi povis sperti la valoran funkciadon de esperanto-organizaĵoj kaj ĝentilecon de fremda popolo.

Antaŭ mia forlaso de Knittelfeld unu samideano bonvolis telegrafi al la delegitoj de UEA en tiuj urboj, kie mi devis ŝanĝi trajnon, por peti ilian helpon. Sed ĉar estis mezo de aŭgusto — feria tempo — mi apenaŭ povis esperi mian renkontiĝon kun ili. Kun iom da maltrankvileco mi envagoniĝis,



Knittelfeld ankaŭ topografie ĝemela kun Kameoka

kiam la atento de la ĉirkaŭaj pasaĝeroj direktiĝis al mi. Sidante mi komencis skribi leteron al mia hejmlando. Maljuna germano kiu sidis antaŭ mi, observadis min skribanta. Subite li komencis ludi harmonikon, mi daŭrigis mian skribadon kaj li ludadis, ŝtele rigardante al mi. Mi aŭdis konatajn melodiojn, kiuj estas de germanaj kantoj. Fine mi kaptis lian geston amikiĝi kun mi. Mi ĉesis skribi kaj per kanto akompanis lin, kiu nun fiere melodiigas. Grupiĝis aliaj pasaĝeroj, kiuj ŝutis al mi la demandojn. “Ĉu vi estas japanino? Ĉu tiu en kiu vi skribas, estas japana lingvo? Kien vi veturas? Ĉu vi sola vojaĝas? Mirige vi kantas nian kanton. Ha! vi estas esperantisto! Bedaŭrinde, mi ne parolas esperanton” ktp. ktp. Germane, Esperante, Angle sed plejparte per sennaciaj gestoj kaj mimikoj, ni sufiĉe povis interkomunikiĝi. Naskiĝis la amikeco, en kiu ni gaje babilaĉadis, sed mi baldaŭ devos adiaŭi la ĵusajn ĝeamikojn pro tio ke mi venis ĉe la stacio, kie mi devas ŝanĝi la trajnon. Ĉu esperantisto atendos min? Se ne, ne gravas, mi povos mem orientiĝi, ĉar verŝajne la stacidomo estas malgranda. Sed kion fari kun miaj kofroj malfacile porteblaj pro ilia pezo. Tiel pensante mi adiaŭis la maljunulon antaŭ mi kaj elvagoniĝis unue kun la malpli peza kofro, kun la intenco poste reveni por porti la alian; sed sekvis min la maljunulo, portante mian pli grandan, pli pezan, kofron. Lasante miajn kofrojn sub lia afabla gardo mi direktis min al fervojisto por demandi, sur kiu kajo mi atendu. Li signis ke mi restu en sama loko. Kiam mi revenis, la germano restis ĉe miaj kofroj, lasante siajn havaĵojn ankoraŭ en la vagono. Intertempe alproksimiĝis al mi 2 homoj kun verda stelo. Bonege! mi saltis kaj salutis. Komenciĝis vigla kaj gaja interparolo en Esperanto. La gesamideanoj klarigis al mi ke mi ne bezonas ŝanĝi la trajnon, sed nur translokiĝi en alian vagonon, kiu bal-

S-ano Kinsuke Ito  
far'igis urbasembleano

S-ano Kinsuke Ito (kies vojaĝraporto aperas sur p. 9) estis elektita en la Urba-sembleon de Kameoka, la 24-an de januaro, gajninte grandan nombron da voĉoj.

Kvardek personoj vetkuris por 30 seĝoj. Dudeknaŭjara s-ro K. Itoo kandidatiĝis, kompreneble, por la unua fojo kaj sendepende de la politikaj partioj. Sekve, li estis la sola 'nekonata ĉevalo', kiu konfuzis ĉies vetojn, lasante nin maltrankvilaj. Sed li estis elektita, rangante kiel la dua, tuŝproksime al la unua, laŭ la nombro de la voĉoj akiritaj.

Filo de s-ro Eizo Itoo, li estis diplomita pri juro ĉe la Kioto-Universitato en 1963.

Nian koran gratulon al la paĉjo kaj la filo! Ni atendas la estontan aktivecon de nia promesriĉa urbasembleano ne nur por la ĝenerala bonfartigo de l' urbanoj, sed por la prosperigo de Kameoka ankaŭ en internaciaj rilatoj! — la Red.

daŭ venos de alia direkto por esti kunligita al la trajno. Mi do veturos per sama trajno nur ŝanĝante la sidlokon. Post kelkaj minutoj mi estis en nova vagono, kiu veturos ĝis Munkeno trapasante la landlimon de Aŭst-rujo. Ankaŭ la bonkora germano, kiu helpis min, veturas en la sama direkto, kaj volis kunesti kun mi kaj translokiĝis en la saman kupeon. Sed survoje al la landlima urbo Salzburg li adiaŭis min, eĉ invitante min al sia hejmo. Estis por mi granda plezuro tiu ĉi konatiĝo eĉ momenta.

Subite pli intima lingvo alflugis al mi; min alparolis usona studentino, kiu vojaĝas, ankaŭ sola, Germanujon. La konversacio fariĝis malpli malfacila ol tiu kun la bonkora germano, sed ankoraŭ granda maloportuneco regis inter ni.

(Daūrigota)

## SPIRITO DE LA ISRAELA SOCIO

Israelo troviĝas sur la ponto inter tri kontinentoj, inter la luliloj de la plej gravaj antikvaj kulturoj, en la punkto de kruciĝo de religioj kaj rasoj, sur la vojo de konkerantoj, de karavanoj portantaj kuracherbojn kaj religiajn ideojn.

La lando de kontrastoj — inter la kulturaj centroj, maroj kaj grandaj dezertoj, malriĉa je materialoj, sed fruktodona je ideoj kaj idealoj, la patrujo de sanktuloj, profetoj kaj dioj, asketoj kaj ribelantoj kontraŭ imperioj.

Sur la malgranda teritorio kruciĝas, miksiĝas kaj sinteziĝas klimatoj fizikaj kaj spiritaĵoj. Malvasta, profunda kaj diversa landeto! Fosu en ĝia ventro kaj vi trovos tavolojn de dudek civilizacioj. Spirita riĉeco kaj materia malforteco kreis la deziron forkuri de la materia mondo kaj krei pli feliĉan anstataŭon. La deziro konkretiĝis en la profeta mesiismo, kiu nenature konservis la ekzistadon de la juda popolo malgraŭ la manko de teritorio, nacia lingvo, malgraŭ la longaj persekutoj kaj miljaraj influoj

de multaj fremdaj kulturoj. La kontakto de la juda popolo kun la lando de Israel konserviĝis mirakle dum preskaŭ du mil jaroj de apartiĝo, pere de militaj bataloj, fideleco al la Biblio, al la preĝo, al la mesiismaj movadoj kaj religiaj enmigradoj por preĝi kaj morti ĉe la Muro de Ploro.\*

La moderna cionismo estas sintezo de la antikva mesiisma sonĝo, ideoj de la franca kleriga movado, la franca revolucio, seniluziigo de esperoj pri emancipado (la pogromoj en 1882–85 en Rusujo, la proceso de Dreyfus, la raskultura antisemitismo en Germanujo kaj Aŭstrujo en la deknaŭa jarcento kaj la naciisma movado en la deknaŭa jarcento).

La moderna cionismo, bazita je la antikva mesiisma sonĝo estis grave influita de la ideoj de la franca kleriga movado, mezeŭropa liberalismo kaj marksismo.

Kelkaj pioniroj estis disĉiploj de Tolstoj (A.D.Gordon), aliaj apartenis al marksista skolo (Boroĥov), ekzistis ankaŭ “burĝaj” kaj ekstreme religiaj cionistoj, kiuj bojkotis la ide-

---

\*) Restinta muro de la Dua Sanktejo, ŝatata pilgrimloko de la judoj dum jarcentoj. Ĝi troviĝas en la Malnova Jerusalemo, nun Jordanio.



## LA KVAR SEZONOJ

Printempe oni plantas  
projektas kapo, koro ;  
ni gaje fajfas, kantas  
dum marŝo al laboro. . .

Aŭtune oni pensas  
nur pri rikolta frukto ;  
nin kiel rekompencas  
prizorgo, ŝvita lukto ?

Somere oni ardas  
en celoriĉa amo ;  
espero volon hardas,  
ne tentas nin la vano. . .

kaj vintre oni sentas,  
jam mankas forto, spito ;  
nin lacajn loge tentas  
la varmaj forno, lito. . .

La Vivo tiel pasas ;  
alternas kvar sezonoj. . .  
nur rememorojn lasas  
por la maljunaj homoj.

---

on de la juda ŝtato, kredante ke nur  
la Mesio rajtas rekonstrui la Ĉefurbon  
de Davido.


La ekstremaj pacifistoj inter la  
pioniroj aspiris al dunacia Ŝtato en  
kuneco kun araboj — la “Alianco de  
Paco” (Buber, Magnes, Simon, Bin-  
jamin) kaj la marksistoj de “Haŝo-  
mer Hacair” — (Juna Gardanto).  
Sed tiuj ekstremaj pacifistoj estis en  
malplimulto.

Tre interesa tendenco en la israela  
socio estas la kooperativa movado,  
enhavanta komunecajn kaj koopera-  
tivajn vilaĝojn kaj urbajn kooperati-  
vojn. La laboristaj movadoj de la tuta

mondo studas kaj imitas la israelan  
eksperimenton, kiu estas aludo por  
solvo de la konflikto inter la kapita-  
lismo kaj komunismo — la paca  
kunekzistado de ambaŭ reĝimoj en la  
plej diversaj landoj.

La antikva lulilo de la sintezo de  
tutmondaj ideoj kreis la novan sin-  
tezon.

La mesiisma sonĝo renaskiĝis en la  
spirito de la modernaj pioniroj sur  
kampoj de socia vivo, scienco kaj  
mirakla renovigo de la antikva kul-  
turo, kiu, kiel ofte en la juda historio  
fruktigas la mondon per novaj ideoj.



La aŭtoro L. Hearn

## La Rakonto pri Mimi-naŝi-Hōiçi

Antaŭ pli ol sepcent jaroj, ĉe Dan no Ura, en la Markolo de Ŝimonoseki, oni batalis la lastan batalon de la longa malpaco inter la Heike aŭ Taira-klano kaj la Genĵi aŭ Minamoto-klano. Tie la Heike tute pereis, kun siaj virinoj kaj infanoj, kaj ankaŭ kun sia infana imperiestro — nun memorata kiel Tennoo Antoku. Kaj tiu maro kaj bordo estis hantata en la daŭro de sepcent jaroj... Aliloke mi rakontis al vi pri la strangaj kraboj troviĝantaj tie, nomataj *Heike*-kraboj, kiuj havas homan vizaĝon sur sia dorso, kaj pri kiuj oni diras ke ili estas la spiritoj de la Heike-samurajoj. Sed ankoraŭ troviĝas multe da strangaj aferoj, kiujn oni vidas kaj aŭdas laŭlonge de tiu marbordo. En ĉiu malluma nokto miloj da fantomfajroj ŝvebas ĉirkaŭ la bordo, aŭ flirtas super la ondoj, — palaj lumoj, kiujn la fiŝistoj nomas *Onibi* aŭ demonfajroj; kaj, kiam ajn la vento leviĝas, la sono de granda kriado venas de tiu maro, kvazaŭ tumultego de batalo.

En la malnovaj jaroj la Heike estis multe pli malkvietaj, ol ili nun estas. Ili leviĝadis ĉirkaŭ la ŝipoj pasantaj dum nokto, kaj penis subakvigi ilin; kaj ĉiam ili gbatis la naĝantojn por subtiri ilin. Estis por pacigi tiujn mortintojn, ke oni konstruis la budhisman templon Amidaĵi ĉe Akamagaseki. Ankaŭ tombejon oni fondis apude, proksime de la bordo; kaj en ĝi oni starigis monumentojn surskribitajn per la nomoj de la droninta tennoo kaj de ties grandaj vasaloj; kaj tie oni plenumis la budhisman servon regule, por la bono de iliaj

spiritoj. De kiam la templo estis konstruita, kaj la tomboj starigitaj, la Heike faris malpli da ĝeno ol antaŭe; sed ili faris plu strangajn aferojn de tempo al tempo — pruvante, ke ili ankoraŭ ne trovis la perfektan pacon.

Antaŭ kelke da jarcentoj vivis ĉe Akamagaseki blindulo nomata Hōiĉi, kiu estis fama pro sia lerteco en recito kaj ludo per bivo. De sia infaneco li estis trejnata por reciti kaj ludi; dum ankoraŭ junulo li estis superinta siajn instruistojn. Kiel profesia biva *hōshi*, li famiĝis pro sia recito ĉefe de la historio pri la Heike kaj la Genji; kaj estas dirite, ke, kiam li ĉantis la batalon de Dan no Ura, “eĉ la demonoj ne povis reteni sin de larmado”.

En la komenco de sia kariero, Hōiĉi estis tre malriĉa; sed li trovis bonan amikon, kiu helpis lin. La bonzo de la Amidaĵi amis poezion kaj muzikon; kaj li ofte invitis Hōiĉi al la templo, por ludi kaj reciti. Poste la bonzo, multe impresite de la mirinda lerteco de la junulo, proponis, ke Hōiĉi faru la templon sia hejmo; kaj ĉi tiu propono estis danke akceptita. Hōiĉi ricevis ĉambron en la templo-konstruaĵo; kaj, kompanse por manĝo kaj loĝo, li devis kontentigi la bonzon nur per muzika prezento en certaj vesperoj, kiam tiu estus alie neokupita.

Unu someran nokton la bonzo estis invitita por plenumi budhisman servon ĉe la domo de mortinta paroĥano; kaj li iris tien kun sia akolito, lasante Hōiĉi sola en la templo. Estis varmega nokto; kaj la blindulo volis malvarmetigi sin sur la engavo de sia dormoĉambro. La engavo rigardis en malgranda ĝardeno malantaŭ la Amidaĵi. Tie Hōiĉi atendis la revenon de la bonzo, kaj provis formuziki la solecon skrapante sian bivon. La noktomezo pasis; kaj la bonzo ne aperis. Sed ankoraŭ la atmosfero estis tro varma por komforto en ĉambro, tial Hōiĉi restis ekstere. Fine li aŭdis paŝojn venantajn el la malantaŭa pordego. Iu travenis la ĝardenon, paŝis al la engavo kaj haltis rekte antaŭ li — sed tio ne estis la bonzo. Obtuzo voĉo vokis la nomon de la blindulo — abrupte kaj sencere monie, en maniero de samurajo alvokanta subulon: —

“Hōiĉi!”

Hōiĉi estis tro surprizita, dum momento, por respondi; kaj la voĉo ree vokis en tono de kruda ordono,—

“Hōiĉi!”

“*Hai*!” respondis la blindulo, timigite de la minaco en la voĉo, — “Mi

estas blindulo! — mi ne povas scii kiu vokas!”

“Estas nenio por timi”, la nekonato laŭtis, parolante pli ĝentile. “Mi restadas proksime de la templo, kaj oni sendis min kun mesaĝo al vi. Mia nuna sinjoro, persono de ekstreme alta rango, nun pasloĝas en Akamagaseki, kun multe da noblaj sekvantoj. Li deziris vidi la scenejon de la batalo ĉe Dan no Ura; kaj hodiaŭ li vizitis tiun lokon. Aŭdinte pri via sperteco en recito de la rakonto pri la batalo, li nun deziras aŭdi vian prezenton: tial prenu vian bivuon kaj tuj venu kun mi al la domo, kie la majesta kunveno atendas”.

En tiu tempo, la ordonon de samurajo oni ne povis facile malobei. Hōiĉi surmetis zoriojn, prenis sian bivuon kaj foriris kun la nekonato, kiu gvidis lin lerte, sed devigis lin marŝi tre rapide. La mano gvidanta estis fero; kaj la grincanta paŝego de la samurajo pruvis ke li estas plene armita, — probable iu deĵoranta palac-gardisto. Unua timo de Hōiĉi estis for: li ekimagis sin bonŝanca; — ĉar, rememorante la certigon de la vasalo pri “persono de ekstreme alta rango”, li pensis, ke la sinjoro kiu deziras aŭdi la reciton ne povus esti malpli alta ol daimio de unua klaso. Baldaŭ la samurajo haltis; kaj Hōiĉi perceptis, ke ili atingis antaŭ larĝan pordegon; kaj li miris tial, ke li ne povis rememori ian larĝan pordegon en tiu parto de la urbeto krom la ĉefpordegon de la Amidaĵi. “*Kaimon!*” la samurajo vokis — kaj eksonis malriglado; kaj ambaŭ enpaŝis. Ili trairis ĝardenan spacon, kaj denove haltis antaŭ ia enirejo; kaj la vasalo kriis per laŭta voĉo, “Al la internuloj! Mi kondukis Hōiĉi!” Tiam aŭdiĝis la sonoj de piedoj rapidantaj, husumoj, ŝirmpordoj malfermiĝantaj kaj virinaj voĉoj interparolantaj. Laŭ la lingvaĵo de la virinoj Hōiĉi ekkonis, ke ili estas servistinoj en iu nobela domo; sed li ne povis imagi, al kiu loko li estis kondukita. Oni apenaŭ donis al li tempon por konjekti. Okazis tiel, ke oni helpadis lin supreniri plurajn ŝtonajn ŝtupojn kaj ĉe la lasta el ili oni diris ke li demetu siajn zoriojn; poste, virina mano gvidis lin laŭ la senlima etendaĵo el polurita tabularo, laŭ la kolonitaj anguloj tro multaj por memori, sur la miriga vastaĵo el tatamita planko, — ĝis en la mezo de ia vasta salono. Tie li pensis, ke multe da grandaj homoj kunvenas: la sono de la silko susuranta estis kiel la sono de folioj en arbaro. Li aŭdis ankaŭ la amasan flustron de voĉoj — parolantaj subtone; kaj la parolo estis tiu de kortego.

Oni diris al Hōiĉi, ke li tenu sin senĝene, kaj li trovis sidkusenon pretigita por li. Kiam li sidiĝis sur ĝi, kaj agordis sian instrumenton, la voĉo de virino — kiun li divenis esti la *Rōjō* aŭ matrono zorganta pri la virina servado —

alparolis lin, dirante, —

“Nun la historio pri la Heike estas bezonata, ke vi recitu en akompano de la bivo”.

Nu, la tuta deklamo bezonigus tempon de multaj noktoj; tial Hōiçi kuraĝis demandi: —

“Ĉar la tuto de la rakonto ne baldaŭ povas esti deklamita ĝisfine, kiu parto do estas moŝte dezirata, ke mi nun recitu?”

La virina voĉo faris respondon:

“Recitu la rakonton pri la batalo de Dan no Ura, — ĉar ĝia kompato estas la plej profunda”.

Kaj Hōiçi laŭtigis la voĉon, kaj ĉantis la ĉanton pri batalo sur la furioza maro, — mirinde elsonigante el sia bivo la strebadon de remiloj kaj la kuradon de ŝipoj, la ekzumon kaj siblon de sagoj, la kriojn kaj la piedbatojn de viroj, la klakegon de ŝtalo kontraŭ la kaskojn, la plongon de la mortigitoj en la maron. Jen dekstre, jen maldekstre de li, dum la paŭzoj de sia ludado, li povis aŭdi la voĉojn murmuri laŭdante: “Kia mireginda artisto!” — “Neniam en nia provinco oni aŭdis tian ludon kiel ĉi tiu!” — “Ne troviĝas tra la tuta imperio iu alia kantisto, kiel Hōiçi” Tiam freŝa kuraĝo venis al li, kaj li ludis kaj ĉantis ankoraŭ pli bone ol antaŭe; kaj la silento pro admiro pli profundigis ĉirkaŭ li. Sed kiam li fine komencis rakonti la fatalon de la belaj kaj senhelpaj — la kompatvekan pereon de la virinoj kaj infanoj, — kaj la mortoplongon de Nii no Ama kun la infana tennoo en siaj brakoj, — tiam ĉiuj aŭskultantoj kune elĝemis unu longan, longan tremkrion de angoro; kaj poste, ili plorkriis kaj plorĝemis tiel laŭte kaj tiel animskue, ke la blindulo estis terurita pro la paroksismo de la malgajeco, kiun li kreis. Dum longa tempo la plorsingultoj kaj lamentoj daŭris. Sed iom post iom la sonoj de lamentado malaperis; kaj en la granda kvieteco, kiu sekvis, Hōiçi denove aŭdis la voĉon de la virino, kiu, laŭ lia supozo, estis la Rōjo.

Ŝi diris: —

“Kvankam oni garantiis al ni, ke vi estas tre lerta bivisto kaj senegala en recitativo, ni tamen ne sciis, ke iu povus esti tiel lerta, kiel vi pruvis vin hodiaŭ nokte. Nia sinjoro estas plezurigita kaj diras, ke li intencas doni al vi konvenan rekompencan. Sed li deziras, ke vi ludu antaŭ li unu fojon ĉiunokte por la venontaj ses noktoj — post tio li probable faros sian majestatan reir-vojaĝon. Do morgaŭ nokte, vi devas veni ĉi tien je la sama horo. La vasalo, kiu hodiaŭ nokte kondukis vin, estos sendita por vi... Mi havas alian

aferon, pri kiu oni ordonis min informi al vi. Estas postulite, ke vi al neniuj parolu pri viaj vizitoj ĉi tien dum la majesta restado de nia sinjoro ĉe Akamagaseki. Ĝar li faras vojaĝon inkognite, li ordonas, ke nenia mencio estu farita pri ĉi tiuj aferoj... Nun vi estas libera reiri al via templo”.

Hōiĉi dece esprimis sian dankon, kaj poste, virina mano kondukis lin ĝis la enirejo de la domo, kaj tie la sama vasalo, kiu antaŭe gvidis lin, atendis por preni lin hejmen. La samurajo gvidis lin ĝis ĉe la engavo malantaŭ la templo, kaj tie adiaŭis lin.

Estis preskaŭ tagiĝo, kiam Hōiĉi revenis; sed lia foresto el la templo restis nerimarkita, — ĉar la bonzo, reveninte hejmen je tre frua horo, supozis, ke li dormas. Dum la tago Hōiĉi povis iom ripozi; kaj li eldiris nenion pri sia stranga aventuro. En la mezo de la sekvanta nokto la samurajo ree venis por li, kaj kondukis lin al la majesta kunveno, kaj tie li faris alian reciton kun la sama sukceso, kiu akompanis lian antaŭan prezenton. Sed dum ĉi tiu vizito, lia foresto el la templo estis hazarde malkovrita; kaj post lia reveno en la mateno la bonzo alvokis lin antaŭ si kaj diris al li per tono de afabla riproĉo:

“Ni estis tre maltrankvilaj pro vi, amiko Hōiĉi. Eliri eksteren, blinda kaj sola je tiel malfrua horo, estas danĝere. Kial vi eliris sen sciigo al ni? Mi povus ordoni al servisto vin akompani. Kaj kie vi forestis?”

Hōiĉi respondis, elturniĝe:

“Pardonu min, afabla bonzo! Mi devis plenumi kelkan privatan aferon; kaj mi ne povis aranĝi la aferon je alia horo”.

La bonzo estis surprizita, pli ol afliktita, pro la vortŝparemo de Hōiĉi: li sentis tion nenatura, kaj suspektis ion en malordo. Li timis, ke la blindulo estas ensorĉita aŭ delogita de iuj malbonaj spiritoj. Li ne plu faris demandojn; sed li sekrete instrukciis al la vir-servistoj de la templo, ke ili prigardu la movadon de Hōiĉi, kaj sekvu lin en okazo se li denove forlasus la templon post mallumiĝo.

Ja en la sekvanta nokto oni vidis Hōiĉi eliri el la templo; kaj senprokraste la servistoj lumigis siajn lanternojn, kaj postiris lin. Sed estis pluva nokto, kaj regis mallumo; kaj antaŭ ol la templo-anoj povis atingi la ĉefvojon, Hōiĉi malaperis. Evidente ke li paŝis tre rapide, — stranga afero, se oni konsideras lian blindecon; ĉar la vojo estis en malbona kondiĉo. La viroj rapidis tra la stratoj, farante enketon ĉe ĉiu domo, kiun Hōiĉi vizitadis; sed neniuj povis doni al ili ian novaĵon pri li. Fine, kiam ili estis revenantaj al la templo



laŭvoje de la marbordo, ili estis mirfrapitaj pro la sono de bivo, ludata furioze, en la tombejo de la Amidaĵi. Escepte de kelkaj fantom'ajroj — kiaj kutime flirtas tie en mallumaj noktoj — ĉio estis nigra en tiu direkto. Sed la viroj tuj rapidis al la tombejo; kaj tie, per helpo de siaj lanternoj, ili trovis Hōiçi — sidanta sole en la pluvo antaŭ la memortombo de Tennoo Antoku, resoniganta sian bivuon kaj laŭte recitanta la ĉanton pri la batalo de Dan no Ura. Jen malantaŭ li, jen ĉirkaŭ li, jen ĉie super la tomboj, la fajroj de la mortintoj estis brulantaj, kiel kandeloj. Neniam antaŭe tiel granda nombro da *Onibi* aperis videble al la okuloj de mortema homo...

“Hōiçi San! — Hōiçi San!” la servistoj ekkriis, — “Vi estas ensorĉita!... Hōiçi San!”

Sed ŝajnis ke la blindulo ne aŭdis. Per ĉiuj siaj fortoj li tintigis, kaj klakigis sian bivuon; pli furioze li ĉantis la ĉanton pri la batalo de Dan no Ura. Ili kaptis lin kaj kriegis en lian orelon:

Hōiçi San! — Hōiçi San! Venu hejmen kun ni tuj!”

Riproĉtone li parolis al ili :

“Interrompi min en tia maniero, antaŭ ĉi tiu majesta kunveno, ne estas indulgeble”.

Ĉe tio, spite la nigran magiecon de la afero, la servistoj ne povis ne ridegi. Jam certaj, ke li estas ensorĉita, ili nun ĉirkaŭprenis lin, kaj lin tirante levis sur liaj piedoj, kaj per tuta forto rapidigis lin hejmen al la templo — kaj ĉi tie, oni senprokraste lin senigis je liaj malsekaj vestaĵoj, laŭ ordono de la bonzo, kaj lin revestis kaj manĝigis kaj trinkigis. Baldaŭ la bonzo insiste petis tutan klarigon pri la terura konduto de sia amiko.

Hōiçi longe hezitis paroli. Sed fine, vidante ke lia ago vere ŝokis kaj kolerigis la bonan bonzon, li decidis ne plu prisilenti, kaj li rakontis ĉion, kio okazis ekde la tempo de la unua vizito de la samurajo.

La bonzo diris :

“Hōiçi, mia kompatinda amiko, vi nun estas en granda danĝero! Kia malfeliĉo, ke vi ne rakontis al mi ĉion ĉi antaŭe! Via mirinda lerteco en muziko kondukis vin en strangan malfacilaĵon. Ĝis nun vi certe jam eksciis, ke vi vizitis neniun domon, sed pasigis viajn noktojn en la tombejo, inter la tomboj de la Heike; — kaj tiel okazis ke antaŭ la memortombo de Tennoo Antoku niaj homoj hodiaŭ nokte trovis vin, sidantan en la pluvo. Ĉio, kion vi imagis, estis iluzio — escepte la viziton de la mortintoj. Unu fojon obeinte ilin, vi metis vin sub ilia mano. Se vi obeos ilin denove, spite la okazaĵon

kiun vi spertis, ili disŝiros vin en pecojn. Sed ili detruus vin, pli aŭ malpli frue, en ĉiu okazo. . . Nu, hodiaŭ nokte mi ne povos resti kun vi : mi estas invitita por plenumi alian servon. Sed antaŭ mia foriro necesos, ke mi protektu vian korpon, skribante sur ĝi sanktajn tekstojn”.

Antaŭ sunsubiro, la bonzo kaj lia akolito senvestigis Hōiĉi : poste, per siaj skribpenikoj, ili nete transskribis sur liaj brusto kaj dorso, kapo kaj kolo, membroj kaj piedoj, — eĉ sur la plandoj de liaj piedoj, kaj sur ĉiuj partoj de lia korpo, la tekston de la sankta sutro nomata *Hannja-Ŝin-Kjō*. Kiam ĉi tio estis finita, la bonzo instrukiis al Hōiĉi, dirante :

“Hodiaŭ nokte, tuj post mia foriro, vi sidigu vin sur la engavo, kaj atendu. Oni vokos vin. Sed kio ajn okazos, ne respondu, kaj ne moviĝu. Nenion diru, kaj sidu senmove, kiel se vi meditas. Se vi moviĝos eĉ iomete, aŭ faros ian bruon, vi estos disŝirita. Ne estu timigita ; kaj ne pensu voki helpon — ĉar nenia helpo povus vin savi. Se vi faros ekzakte kiel mi diris, la danĝero pasos, kaj vi nenion havos plu por timi”.

Post mallumiĝo la bonzo kaj la akolito foriris ; kaj Hōiĉi sidigis sin sur la engavo, laŭ la instrukcioj donitaj al li. Li metis sian bicon sur la planko, tuj apud si, kaj, preninte al si pozicion de medito, li restis tute senmova, zorgante, ke li ne lasu sin tusi, nek spiri aŭdeble. Dum horoj li restis tiel.

Baldaŭ, el la direkto de la ĉefvojo, li aŭdis veni la paŝojn. Ili pasis la pordegon, travenis la ĝardenon, paŝis al la engavo, haltis — rekte antaŭ li.

“Hōiĉi !” la profunda voĉo vokis. Sed la blindulo retenis sian spiradon kaj sidis senmove.

“Hōiĉi !” rigore vokis la voĉo la duan fojon. Poste la trian fojon — sovaĝe :  
“Hōiĉi !”

Hōiĉi restis senmova kiel ŝtono, — kaj la voĉo grumblis :

“Nenia respondo ! — tio ne devas esti ! . . . Devas vidi, kie la ulo estas” . . .

Aŭdiĝis paŝobruo de la pezaj piedoj survenantaj sur la engavon. La piedoj alpaŝis malrapide, — haltis apud li. Kaj, dum longaj minutoj, — dum Hōiĉi sentis tremadi sian tutan korpon laŭ la batado de sia koro, — daŭris morta silento.

Fine la kruda voĉo murmuris apud li :

“Jen troviĝas la bivo ; sed de la biva ludisto mi vidas sole la du orelojn ! . . . Jen mi vidas kial li ne respondis : li ne havas la buŝon por respondi — nenio restas de li krom liaj oreloj. . . Nun mi prenos ĉi tiujn orelojn al mia sinjoro — por pruvi, ke mi obeis la moŝtan ordonon kiom mi nur povis” . . .

En tiu momento Hōiçi sentis siajn orelojn kaptitaj per fingroj el fero, kaj ŝiritaj for ! Granda estis la doloro, sed li ne ellasis krion. La pezaj piedsonoj retiriĝis laŭ la engavo, — descendis en la ĝardenon, — forpasis al la ĉefvojo, — ĉesis. El ĉiu flanko de sia kapo la blindulo perceptis densan varman elgutadon ; sed li ne kuraĝis allevi siajn manojn. . .

Antaŭ sunleviĝo la bonzo revenis. Li tuj rapidis al la engavo malantaŭa, surtretis ion malsekan kaj ekglitis, kaj elkriis hororon ; — ĉar li vidis, per la lumo de sia lanterno, ke la malsekaĵo estis sango. Sed li rimarkis, ke Hōiçi sidas tie, en meditanta pozicio — kun la sango ankoraŭ erupciantaj el liaj vundoj.

“Kompatinda, kompatinda Hōiçi!” la bonzo diris — “ĉio estas mia kulpo — mia gravega kulpo!... Ĉie sur via korpo ni skribis la sanktan tekston — krom sur viaj oreloj! Mi konfide lasis al mia akolito fari tiun parton de la skribo; kaj mi treege kulpis ne certigante al mi, ke li plenumis ĝin!... Nu, la afero jam ne estas savebla, — ni povas nur klopodi kuraci viajn vundojn kiel eble plej frue. . . Havu kuraĝon, amiko! — la danĝero jam forpasis. Vi neniam estos ree turmentata de tiuj vizitantoj”.

Sub la zorgo de bona kuracisto, Hōiçi baldaŭ resaniĝis je siaj vundoj. La rakonto pri lia stranga aventuro disvastiĝis, kaj baldaŭ famigis lin. Multaj nobluloj iris al Akamagaseki por aŭdi lian reciton; kaj faris al li multajn donacojn el mono tiel, ke li fariĝis riĉegulo... Sed depost la tempo de lia aventuro, li estis konata nur per la nomo *Mimi-naŝi-Hōiçi*: “Hōiçi-la-Senorela”

Trad. T. Nakamura

I-a Esperanta Ekspozicio aranĝita de la Ribeirão Preto Esperanto-Klubo, 14/24 -12- '66. De maldekstre: s-ro Nilton Teixeira de Andrade, s-ro José Pedro Miranda kaj d-ro José de Freitas Ramos.



## **Pri mia restado kaj laboro en Japanujo (2)**

Al Jokohama mi alvenis iom antaŭ la kurstempo, tiel ke mi povis ĉeesti en Jokosuka, la “Jubilean” kunvenon pro la 60-a jaro de la Esperanta Movado en Japanujo. Tiam, mi deziris konatiĝi kun kelkaj el la veteranoj, kio estis tute ne ebla, ĉar post ilia foriro el la podio, oni kvazaŭ kaŝis ilin en aparta ĉambro kaj, poste, en intima manĝejo. Pro tio, neniue el la nova generacio de la japana movado povis kontakti ilin, bedaŭrinde. Ion alian mi tre bedaŭris, plie; tio estas ke nur regionaj samideanoj, ne tro multaj cetere, partoprenis tiun kunvenon, kvankam ĝi estis jubilea. Verŝajne tion kaŭzis la fakto, ke la japana movado estas ankoraŭ tro splitita, ne homogena, pro la apartaj asocioj, kiuj okupiĝas pri Esperanto. Kiom forta estus nia movado tie, se formiĝus tutlanda asocio! Sed mi revenu al mia temo!

En Jokohama mi parolis pri Hindujo kaj ĝiaj lingvoj. Tie, ni ne povis resti en la loko, kie okazis la rapidkurso, sed devis serĉi alian lokon por la seminario. Ni povis havi ĝin ĉirkaŭ tablo, en sufiĉe taŭga angulo de stacidoma restoracio. En tiu urbo, dum dimanĉa kunveno, mi priparolis

la alilandajn kunvenojn, laŭ la deziro de la klubanoj. La saman vesperon, venis tien eksterurba klubeto, al kiu mi prezentis la Cseh-metodon, kun posta demonstracio.

Plie, dufoje en la sama mezgrada lernejo, mi priparolis Esperanton, ankaŭ kun provleciono.

El tiu urbo mi iris al Nagoja, kie dum publika kunveno, mi denove parolis pri Hindujo kaj ĝiaj lingvoj. Dum mia restado tie, mi ankaŭ alparolis grupon da nejunaj, diversprofesiaj sinjoroj, kunvenintaj ĉe sia lerneja samklasano, malnova esperantisto.

Kaj mi atingis la lastan halton de mia vojaĝo, Macuzaka. Bonega propagando estis farite tie, pere de granda ŝildo kontraŭ la stacidomo, kaj belaj afiŝoj multloke en la urbo, ĉio prizorgita de unu sola persono, fervora esperantisto, kiu iam antaŭe estis invitinta min al sia urbo por, kun sia amiko, praktiki nian lingvon.

Tre bedaŭrinde, pro la supozo, ke mi tre baldaŭ foriros el Japanujo, la projektitaj kursoj estis treege mallongaj tie. Ili komenciĝis per informado pri mia esperantista vivo, registrita per magnetofono, kiel okazis en



En Macuzaka

pluraj urboj dum miaj paroladoj aŭ miaj lecionoj.

Dum kelkaj pliaj tagoj tie, mi povis paroligi gejunulojn kaj la malnovajn samideanojn de la urbo.

Antaŭ mia forveturo, en apuda vilaĝo, mi ĉeestis aranĝon de virina societo, kiu kunvenis por aŭskulti paroladon pri eksterlanda vojaĝo de fakulo, kiu tiam kontaktis esperantistojn diversloke. Poste, kvankam parolante pri la japanaj virinoj laŭ mia vidpunkto, mi sukcesis aldoni la esperantan temon, kio permesis al mi disdoni multajn informilojn pri nia lingvo.

Ne estas tempo nomi ĉiujn personojn, kiuj prizorgis la kursojn, aperigis gazetartikolojn aŭ montris al mi interesaĵojn, sed, tie ĉi, mi sincere dankas ĉiun aparte kaj grupe, ĉar ili montriĝis sindonaj kaj helpemaj en multaj cirkonstancoj.

La resumo pri mia trimonata vojaĝo estas, ke en 8 urboj, mi

parolis entute 20 fojojn, antaŭ 1032 personoj.

Pere de la Cseh-metodaj rapidkursoj, mi instruis 253 personojn, plejparte novuloj aŭ komencintoj el diversaj kursoj. Tiuj rapidkursoj celis praktike montri al la 66 esperantistoj, kiuj partoprenis la seminariojn, la disvolviĝon de normala kurso. Kvankam ne estis eble, ke mi detale faru ĉiun lecionon, mi povis almenaŭ klarigi la manieron uzatan por paroligi la komencantojn kaj komprenigi al ili la gramatikaĵojn, sen uzo de nacia lingvo.

En kelkaj urboj oni bone komprenis tion kaj komencis novajn kursojn poste, enprenante iom el la akiritaj spertoj.

Ĝenerale la rezultato estas kontentiga, se oni konsideras, ke estas ne facile adopti tute novan instrusistemon, sen sufiĉa studado kaj provoj pri ĝi.

Sed io estas certa. Tio estas, ke la novuloj tre ŝatis lerni tiamaniere, kaj, ĝenerale bedaŭris, ke la kurso estas tro mallonga. Tio montriĝis ĉie, kie iu kvanto da lernantoj perdiĝis pro la ŝanĝo de metodo en la instruado, aŭ pro ne serioza lernemo. Kaj la daŭre lernemaj personoj estas pli multaj ol oni estus povintaj esperi pro anonco de ordinara kurso.

La konkludo estas, ke mia vojaĝado ne estis vana, ĉar multloke mal-

novuloj, venintaj al la kursoj pro nura scivolemo, reakiris veran intereson pri nia lingvo.

Reveninte al Kameoka, mi komencis prepari min por forvojaĝo la 3-an de aŭgusto. Sed, ne atendite mi povis prokrasti ĝis la 13-a de septembro, ĉar la polico permesis, ke post la fino de mia restadpermeso, mi restu 90 pliajn tagojn. Tiu bonŝanco, kaj la prizorgoj rilate al mia ŝipbileto, permesis, ke mi denove vojaĝu tra Japanujo.

Unue mi iris, sed nur la duan tagon posttagmeze, al la 50-a Japana Kongreso en Nagoja. De tie mi atingis Tokio'n por tie ricevi mian ŝipbileton, kaj poste Ucnomija'n, dank' al invito de tieaj klubanoj, kiujn mi renkontis en Nagoja.

Dekduo da gejunuloj kunvenis la unuan vesperon, en kafejo, por gaje babili kun mi. La postan tagon, 5 el ili akompanis min al Nikko, kie du pliaj junulinoj atendis nin, por pasigi la tagon kun ni. Vespere mi parolis al la klubanoj de Ucnomija pri la Cseh-metodo, kun demonstracio.

Kaj, post dua tranokto tie, mi revojaĝis al Tokio por alveni, fine, al Okajama, kiu, fakte, estis la celo de tiu vojaĝo. Tie oni atendis min por eta, dutaga seminario, kiu, kvankam mallonga, bonege sukcesis, laŭ informoj poste ricevitaĵaj pri la deziro de la

lernantoj serioze lerni nian lingvon.

Pro invito de alia esperantisto dum la kongreso en Nagoja, mi iris poste al la insulo Ŝikoku. En Tokuŝima mi kontaktis iom izolajn samideanojn, kiujn kunvenigis mia gastiganto.

La duan tagon ni kune vizitis la marbordon ĉe Naruto por rigardi la famekonatan akvokirliĝon. Estis projektite, ke mi restu ĝis la posta tago, sed tion ne permesis la tajfuno, anoncita por tiu tago. Mi estis devigata foriri per la plej unua "flugŝipo", kiu kondukis min al Kobe en nur 80 minutoj. Post la finordigo de mia ŝipbileto tie, mi revenis al Kameoka por konstati, ke restas multe da farotaĵoj antaŭ mia foriro el Japanujo.

Tiu bela lando, ornamita de montoj kaj belaj kampoj, kun sia mondfama monto Fuji, longe restos en mia memoro. Tiel estos ankaŭ pro la granda aĝableco al mi montrita en



En Kobe, la 13-an de sept., '66:  
"Bonan vojaĝon!"



Kameoka kaj en la diversaj lokoj, kien mi iris, kaj pro la ĉarma gastamo de la samideanoj, en kies hejmoj mi restadis. Krome, mi ricevis multajn memoraĵojn, kiujn mi povas kompensi nur per miaj plej varmaj kaj tutkoraj dankoj al ĉiuj, kiuj tiel plezurigis min. Ili restos ĉe mi, kiel atestiloj de la sindona bonkoreco de la filoj de la legende kavalirecaj samurajoj, en kies lando mi spertis multe da agrablaj horoj, malgraŭ la fakto ke, laŭ diro de S-ro Umeda, el la Eksterlanda Fakto de Oomoto, oni klopodis multe “ekspluati” min.

Mi ĝojas kaj plej dankas ĉiujn, kaj aparte S-ron Esumi, la estro de tiu fakto, pro tiu interesa kaj utila “ekspluatado”, kaj deziras al ĉiuj japanaj esperantistoj ĉion bonan, kaj daŭran entreprenemon por antaŭenpuŝi nian movadon en Japanujo.

(fino)

## Nekrologo

La 22-an de januaro 1967 mortis en Udine s-ro Giovanni Della Savia, la reprezentanto de la revuo Oomoto en Italujo. Kun kora danko al la forpasinto ni partoprenas la funeb-ron de lia familio kaj sincere kondolencas.

La Red.

## TANKA O J EL OKCIDENTO

Eĉ dum nordvento  
furiozfride mordas,  
printempo venas,  
kaj burĝonaj promesoj  
eltenas en atendo.

\*

Per vi, Doloro,  
mastrin' de miaj tagoj,  
kunino nokta,  
ŝtoniĝu mia koro  
al eternaj perdadoj. . .

\*

La nudan Veron  
kaptemas vi sendube,  
sed kun primokoj  
la liberama damo  
elglitas for ennube !

\*

Rideto mia  
migris el fruaj jaroj  
dum malantaŭe  
grimacas la dezerto  
de ja perditaj faroj.

*Paul Lobut*

## *Skribas niaj legantoj*

Paĝo 156 “Oomoto” (1966). En Esperanto estas tre grave, ke la pozicio de adjektivo neniel efiku sur la sencon; en la Franca tio ja okazas, je forta ĝeno al studantoj. Ni nepre evitu tion: La *senco* de adjektivo restu la sama, ĉu antaŭ aŭ post substantivo. Alie ni riskus komplikadojn detruajn por la internacia lingvo.

Estas kvar motivoj por uzado de libera lokigo de la adjektivoj:

1) la eŭfonio, belsoneco. Evitu du samajn vokalojn, ekzemple: artismo arlekena; armilo tranĉa; akto formala, kie oni evitas kolizion de du a-sonoj.

2) la ritmo, rimo kaj metro ĝenerala. Per tio la poeziaj rimedoj estas mirinde pli grandigeblaj.

3) en rapida tajpado aŭ skribado oni iufoje preterlasas enmeton de antaŭa adjektivo. Senĝene oni povas flugpense korekti la frazon per neta enmeto de la intencita adjektivo, sen forstreko kaj reskribo.

4) pro la regulo, aŭ konsilo, de Zamenhof, ke “la peza vorto staras en la fino de frazo”. Do, uzu: ... per faro artifika; piko turmentega; nodo nemalimplikebla.

Cetere, por mi “tempo pasinta”, “pasero kaptita”, “vortoj komunaj” ŝajnas pli belsonaj ol inverse. Ĉu ankaŭ por Japanoj?

*F. R. Banham*

### *Redakcia noto*

Jen pli ol unu leganto prenis la aferon serioze. Sed la tezo de vortordo: akjektivo kaj substantivo, en si mem estas konsiderinda. Ni plene konsentas, kaj kredas ke multaj el niaj legantoj konsentos kun s-ro Banham, kiel li pritraktis ĝin ĉisupre.

★ *Hans Ph. Gunkel*,  
ZIRKENBACH, Germanujo

Mi dankas pro via sindona laboro favore al ESPERANTO kaj per tio por la mondpaĉo. Via revuo estas porpaca dokumento, el kiu niaj posteuloj povos prijuĝi niajn multajn klopodojn por vera bonfarto de l' homaro, kiu abomenas armilojn kaj malbenatan militon!

\*

★ *Miroslav Grgurić*,  
Ravna Gora, Jugoslavio

Mi tute konsentas vian respondon al s-ro J. Casto al lia demando pri la “Recenzo” de s-ino J. Čichová (“OOMOTO” n-roj 311/312--317/318).

Se temas pri kulturo, kiu kultura homo povus prisilenti la “kulturan” semadon de la plej aĉaj kruelaĵoj super manplateto da loĝantoj kiuj strebas sian sendependecan kaj pacan vivon en sia propra lando?

Rigardante ĉiutage televidelsendojn pri tiu kruela agado, kaj la amasajn popolajn demonstraciojn en preskaŭ ĉiuj landoj kontraŭ tiu agado, oni rajtas rekteldiri ke la situacio en Vjetnamio estas neniam “politika malverajo”, sed tio estas bedaŭrindege *nuda veraĵo*, kiun la progresema esperantisto ĉiurimede klopodas --pro sia idealo de interpopola amikeco, pere de la lingvo Esperanto --kontraŭstari.

\*

★ *Philip Buttinger*,  
London, Britujo

Mi tute konsentas kun vi, ke Oomoto rajtas kaj devas pritrakti ĉiun problemon de la homaro inkluzive la militon en Vjetnamio. Tamen plendoj kontraŭ la krueleco de la milito, eĉ faktoj pri kruelaj agoj faritaj de unu flanko aŭ la alia ne helpas nin solvi la militon.

Oomoto kiel religia kaj morala asocio

## **S-ro J. Umeda** **revenis el Havajo**

Post 8-monata misiado en la insularo de Havajo, Usono, s-ro Joŝimi Umeda revenis al la Oomoto-centro, la 13-an de januaro, 1967. Tri tagojn pli frue li jam estis alveninta en Tokion per aviadilo de Japan Air Lines, kaj bonvenigita de oomotanoj, inkluzive de s-ro N. Esumi, lia fakestro, kaj esperantistoj en Tokio, s-ro Ŝ. Mijake, ĝenerala sekretario de Japana Esp-Instituto kaj aliaj.

Dum sia restado en Havajo, plejparte en la ĉefurbo Honolulu, s-ro Umeda okupiĝis en la laboroj de Oomoto-misiado per persona vizitado al hejmoj, farado de radio-prelegoj regulaj, konstanta kontribuado al la ĵurnaloj kaj televidaj programoj ktp., kiuj entute vekis grandan intereson de publiko al la Oomoto-movado en la paradizo de Pacifiko.

Krom la misiaj laboroj, li organizis kiel fervora esperantisto la Esperanto-klason en Honolulu, kunlabore kun s-ro Bunnie J. Chambers, tiea delegito de UEA. La klason vizitadis dekduo da entuziasmaj homoj, kiuj finis la elemen-

---

devas klare diri, ke neniuj homoj ĉu Usona, ĉu Komunista rajtas starigi registaron kontraŭ la volo de la popolo. Ĝuste aŭ malĝuste la komunistoj komencis la militon, ĉar ili ne fidis la registaron de sia lando. Oomoto laboru por ke la registaro reprezentu la opinion de la popolo aŭ almenaŭ la plejmulto de la popolo. Laŭ mi ni devas serĉi la solvon tra la Unuigintaj Nacioj. U. N. devas transpreni la respondecon por ebligi liberajn elektojn. Nur tiam la homoj de Sud-Vjetnamio mem povas elekti, ĉu ili volas vivi sub komunista registaro aŭ ne.

tan kurson sub la gvidado de s-roj Umeda kaj Chambers, kaj daŭrigas la studadon.

En decembro 1966, s-ro Umeda vizitis dum tri semajnoj Kalifornion, Usono, por tie renkontiĝi kun multaj esperantistoj kaj montri la 16-mm. koloran filmon pri la Oomoto-Internacia Festivalo; li partoprenis kvin fojojn Zamenhof-festobankadon en kelkaj urboj kaj festoparolis post la prezento de la nomita filmo.

Liaj spertoj kiel misiisto de Oomoto kaj esperantisto akiritaj el la por li nova medio aperos en nia revuo baldaŭ poste.

Li dankas al ĉiuj esperantistoj, profitante ĉi tiun okazon, kiuj malavare helpis lin en diversaj okazoj.

---

## **Anonco**

### **Al la legantoj**

Ni kore dankas vin pro la akurateco kun kiu vi ĉiam reabonas nian revuon. Ni atendas ke ankaŭ por la nova jaro, vi nepre abonos la revuon "OOMOTO".

Se via abonpago ankoraŭ ne atingis nian redakcion, tio estus pro malfacilaĵoj, kiujn ni ja bone konas. Tamen ni daŭrigas la sendadon de nia organo, certaj pri tio ke vi senprokraste renovigos la abonon por la jaro 1967.

Kun anticipa danko,  
salutas via

Eksterlanda Fakoj de Oomoto  
Kameoka, Kioto-hu, Japanujo

# S T A F E T O

## BELLITERATURA SERIO (16×22.5 cm)

*Lastaj titoloj aperintaj. Prezoj en usonaj dolaroj*

17. Marcel Pagnol : TOPAZE ; Charles Vildrac : LA ÂIPEGO  
«TENACITY». Elfrancigo de Roger Bernard. Prezentoj de Gaston  
Waringhien. 1960. 292 p. 2.00

18. William Shakespeare : OTELO, LA MAŬRO DE VENECIO.  
Elangligo kaj enkonduko de Reto Rossetti. Antaŭparolo de Roy Walker.  
1960. 208 paĝoj. 1.80

19/20. Raymond Schwartz : KIEL AKVO DE L' RIVERO.  
Originala romano. 1963. 488 p. Broŝ. 3.00 Tolbind. 3.80

21. Stellan Engholm : HOMOJ SUR LA TERO. 2a reviziita  
eldono. Enkonduko de Ferenc Szilágyi. 1963. 236 p. + bildoj.  
Broŝ. 2.00 ; Tolbind. 2.80

22. 33 RAKONTOJ. LA ESPERANTA NOVELARTO. Redakto  
de Reto Rossetti kaj Ferenc Szilágyi. Enkonduko de Ivo Rotkvič. 1964.  
352 (xx + 332) p. Broŝ. 3.00 ; Tolbind. 3.80

23. Lajos Tárkony : SOIFO. Poemkolekto. Antaŭparolo de K.  
Kalocsay. 1964. 232 p. 2.40

24. William Shakespeare : HAMLETO, PRINCO DE DANUJO.  
Traduko, enkonduko kaj notoj de L. N. M. Newell. 1964. 252 p. 2.40

25. Teodoro S. Švarc : MASKERADO ĈIRKAŬ LA MORTO.  
*Nazimondo en Hungarujo*. Memorlibro. Antaŭparolo de J. Régulo.  
1965. 264 (8 nenumeritaj + 248 + 8 bildo-) paĝoj. 2.80

26. José Hernández : MARTÍN FIERRO, Argentina eposo  
tradukita de Ernesto Sonnenfeld. Enkonduko de Ivo Lapenna. Antaŭ-  
parolo de Ernesto Sonnenfeld. Prezento de Julio Mafud. Apendico de  
Juan Régulo Pérez. Ilustraĵoj de Enrique Rapela. Volumo No. 5 de la  
Serio Oriento-Okcidento sub aŭspicioj de U.E.A. 1965 [1966]. 294  
(2 nenumeritaj + 292) paĝoj. Nur Toldind. 3.80

Mendu ĉe : Universala Esperanto-Asocio

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando